

Senpera prepoziciigo
Claude Gacond, 216-a radioprelego, 1967.11.29 & 1967.12.02

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vidis kiel sufiksoj kaj prefiksoj forlasis sian etimologian klasikan funkcion vortfaradan por fariĝi en esperanto memstaraj vortoj. Ni diris kelkajn rapidajn vortojn pri la senpera verbiĝo de adjektivoj. Ni konstatis, ke nenio malebligas konsideri, ke la substantivoj **miliono** kaj **miliardo** povas doni la numerajn adjektivojn **milion** kaj **miliard**. Ĉu inverse **deko**, **cento** kaj **milo** analoge ne originas de **dek**, **cent** kaj **mil**?

A.- Antaŭ okdek jaroj, kiam nia lingvo naskiĝis, kiu estus imaginta en ĝi tiom da latentaj evolu-fortoj. Simile al semo ĝi posedis potencon ĝermon. Nun el ĝi kreskas nova idiomo. Se ĝi similas al la ceteraj eŭropaj lingvoj, fakte ĝi posedas ecojn, kiuj mankas en la patraj lingvoj. Tiuj ecoj donas al la zamenhofa lingvo grandan propran dinamismon.

Cl.- Antaŭ nova situacio esperanto ne rigardas al la antikveco, kiel la eŭropaj kulturaj lingvoj. Ĝi alfrontas la vivon ĉerpante en sia propra riĉeco. Pro tio ĝi jaron post jaro malkovras novajn latentajn fortojn. Anstataŭ ĉerpi el la greka kaj latina, ĝi kreas. Jen unika kaj entuziasmiga fenomeno.

A.- Favoras tiun kreemon la varieco de la esperanta esprimpovo. Regula gramatiko igas komparojn okulfrapajn. Aŭtomate konkludoj sin trudas. Lingvaj eksperimentoj estas konstante provataj. Esperanto estas kvazaŭ kemia laboratorio. La esperantistoj ĵonglas per kelkaj fundamentaj gramatikaj fonemoj. Ĉu tiu ĵonglado ne pensigas al la laboro de la kemiistoj? Per kelkaj atomaj elementoj ili kapablas krei senfine novajn materiojn.

Cl.- Ni hodiaŭ provu laboratorian eksperimenton. Vi jam rimarkis, ke escepte adverbojn, prepoziciojn, konjunkciojn, pronomojn kaj interjekciojn, ĉiuj radikoj ricevas gramatikan finaĵon.

A.- Celo de la eksperimentado: la prepozicioj kapablas ricevi gramatikan finaĵon. Tiam ili fariĝas senpere verboj, substantivoj, adjektivoj. Ĉu verboj, substantivoj, adjektivoj kapablas fariĝi prepozicioj?

Cl.- Unue ni observu kelkajn prepoziciojn. Per la prepozicioj **en**, **ekster**, **sub**, **sur**, **super** ni povas formi frazojn, kie tiuj prepozicioj ne plu estas prepozicioj. Aŭdu:

A.- Mi pentras la **enon** kaj **eksteron** de kesto. La **subo** de la lito estas polva, la **suro** estas kovrita de bela tuko.

Cl.- Mia forto **superas** la vian. Kuru **eksteren**!

A.- Oni povas imagi situacion. Jen klasejo. Instruisto komentas verkaĵojn de gelernantoj. Li montras, kiel peza frazo povas esti plibonigita. Aŭdu lin:

Cl.- La instruisto: *Vi skribis: « La masonisto transportis la brikojn **pere de** ĉareto. » Ĉu vi ne rimarkas, ke tiu **pere de** estas stile peza? Kiu povas plibonigi tiun frazon? Ĉu vi Liza?*

A.- Liza: *Jes, oni povus diri pli simple: « La masonisto transportis la brikojn **per** ĉareto. »*

Cl.- La instruisto: *Bone! **Per** sufiĉas. Do kial **pere de**? Same estus por « Li ludas **ekstere de** la domo. » Li ludas **ekster** la domo sufiĉus. Kiu trovas aliajn ekzemplojn?*

A.- Rolfo: *Mi telefonas **pere de** telefonilo. Aŭ: Mi telefonas **per** telefonilo.*

Cl.- Luko: *Mia domo situas **fine de** la urbdoma strato. Aŭ: Mia domo situas **fin** la urbdoma strato.*

Senpera prepoziciigo

Claude Gacond, 216-a radioprelego, 1967.11.29 & 1967.12.02

A.- Nu, se vi estus la instruisto, kion vi respondus ? Analogio kondukis lernanton al interesa ekzemplo. Racie la formulo **fin la strato** estas ĝusta. Nur ĉar la naciaj lingvoj ne kapablas formi prepozicion el verbo, la esperantistoj ne riskis tian senperan prepoziciigon. Ĉu la profesoro pedante devus malpermesi la formulon **fin la strato** ? Kion vi farus, se vi estus en lia loko ?

Cl.- Ŝajnas, ke mi montrus al la gelernantoj, ke la formulo **fin la strato** ne estas kontraŭa al la *Fundamento de Esperanto*, do ebla, sed ne kutima. Stile ĝi eĉ estas agrabla. Poste mi petus aliajn similajn ekzemplojn, kie adverbigita verbo povus fariĝi prepozicio. Serĉu bone :

A.- Marta : *Mi korespondas kun japanoj **helpe de** esperanto. Aŭ : Mi korespondas kun japanoj **help** esperanto.*

Cl.- Oni povus ankoraŭ pli simple diri **per** esperanto. Tio pravas, ke **help** estas prepozicio. Kiu trovas alian ekzemplon ?

A.- Johano : *Li venis **spite** malpermeson. Aŭ : Li venis **spit** malpermeso.*

Cl.- *Jen tre interesa ekzemplo. Senscie vi anstataŭis la prepozicion **de** per la akuzativa marko. Vi estus devinta unue diri : Li venis **spite de** malpermeso. Sed via lingva sento kondukis al la pli agrabla Li venis **spite** malpermeson. Vi rimarkas, ke **spit malpermeso** estas interesa rimedo por forigi la akuzativon. Oni ne renkontas tiajn formojn en la nuna esperanto. Sed tio neniel signifas, ke foje verkisto ne uzos tiun rimedon por malpezigi siajn frazojn, kiam tio ŝajnos al li necesa. Kiu ankoraŭ trovas ekzemplon ?*

A.- Marta : *La preĝejo staras **meze de** la vilaĝo. Aŭ : La preĝejo staras **mez** la vilaĝo.*

Cl.- Tiu instruisto poste povos montri, ke la verbo **fari** jam donis prepozicion, kiu sporade aperas ĉefe en sciencaj tekstoj. Vi certe foje renkontis tiun prepozicion **far**, kiu estis longe kritikata.

A.- En tiu klasejo, eble pro nescio de lernanto, latentia eblo de esperanto estis subite malkovrita.

Cl.- En alia lingvo la instruisto estus dirinta : Ne, tiu formo ne estas permesata. Sed en esperanto, li ne povas respondi tiel, ĉar se formo respektas la regulojn, kiuj troviĝas en la *Fundamento*, ĝi latentas en la lingvo. Ĝi estas nova, sed absolute ebla.

A.- Kiam la esperantistoj provas klarigi al neesperantistoj la eksterordinaran riĉecon de la zamenhofa lingvo, malofte ili pensas al tiuj latentaj ebloj mem solvi stilajn demandojn. Ili ĉefe restas je la vortara nivelo, kaj en tio ili imitas la kontraŭojn al esperanto, kiuj en lingvo vidas ĉefe vortojn.

Cl.- Lingvo riĉas, ne nur kiam la vortaro enormas, sed ĉefe kiam la esprimebloj abundas. Ni esperas, ke dum tiu preleg-serio ni helpis vin malkovri nekonatajn aspektojn pri la riĉeco de nia lingvo.

A.- Tiel vi eble ĝin pli bone vartos, kaj tiel pretigos senscie la alvenon de la venka tago. Tio estas la apero en Esperantujo de kolosa genia verkisto, kiu kapablos enkarnigi en ĉefverkon ĉiujn ecojn proprajn al nia lingvo. Ne estas propagando, kiu venkos super publikan indiferentecon, sed talento. Nin interesante pri nia lingvo kaj pri ties literaturo, ni venigas tiun forton.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-